

N-ro 171 printempo 2021

ISSN-1565 3315

ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו



Jam komence de 2021 Israelo pioniris en la kontraŭ koronavirusa vakcina kampanjo. Dank' al ĝia efika sanservo, ene de 2-3 monatoj Israelo vakcinis pli ol duonon de sia enloĝantaro - senprecedenca atingo tutmonde. La vakcinoj montriĝis tre efikaj por bremsi la pandemion.

Sur la bildo - Amri apud afiŝo de unu el la sanservoj. Sur ĝi estas skribita: “Ĉi tie oni vakciniĝas kontraŭ koronaviruso” Pli detalan informon legu en la artikolo sur la paĝoj 3 – 8.

La redaktoro
Mikaelo Lineckij
mikaelo@esperanto.org.il

La reviziantoj:
Gabi Zeevi (Israelo)
Andreo Peçonkin (Rusio)

ELI-Prezidanto
Jehoŝua Tilleman

La redakcia poŝta adreso: P.O.K. 22041, 61220 Tel-Avivo

Karaj legantoj!



Miajn gratulojn!!! Unue, Israelo, ŝajne, estas ĉe sojlo de venko en batalo kontraŭ kovarda infekto! Due, estas lanĉita nova rubriko: "Israela Esperantisto" prezentas israelajn esperantistojn! Dezirantoj prezenti sin - ek! Rakontu pri: kiam kaj kie vi naskiĝis, ĉu repatriiĝis, kiam kaj kiel vi aliĝis al Esperanto, interesaj impresoj ligitaj al Esperanto ktp... Ne forgesu aldoni la foton. Mi kaj la legantoj tre atendas...

La retejo:

<http://esperanto.org.il/ie.html>

La enpaĝigo:

Mikaelo Lineckij

Abontarifo eksterlanda:

10 eŭroj. Eblas pagi per UEA al la konto elia-q aŭ mendi ĉe Libro servo de UEA.

RIPETO. Eblas ricevi koloran version de la revuo al sendita de vi elektronika poŝtadreso kaj tia abono kostos por vi nur 5 €! Via elektronika poŝtadreso atendatas. Kelkaj abonantoj jam uzas tiun servon.

La enhavo:

Kovid-19 kaj vakcino-21 - <i>Amri Wandel</i>	3
Prezento de israelaj esperantistoj - <i>Gavriel Zeevi</i>	9
La forpasoj	12
Disleksio kaj Esperanto - <i>Hans Dahl</i>	13
Interese <i>Traduko de Mikaelo Lineckij</i>	16
El Japanio	17
Intervjuo kun Renato Corsetti	18
LitSupO Odesa anekdotoj <i>traduko de Mikaelo Lineckij</i>	21
Anekdotoj <i>Tradukoj de Mikaelo Lineckij</i>	22
Kiel vi fartas? <i>Traduko de Mikaelo Lineckij</i>	23
Rakontetoj kun moralo <i>Traduko de Mikaelo Lineckij</i>	24
Poeziaĵoj de Eŭgenia Slovaĉevskaja	26
Ses kurtaj rakontetoj <i>Traduko de Mikaelo Lineckij</i>	27
21-a Israela Kongreso - <i>Amri Wandel</i>	28

KOVID-19 KAJ VAKCINO-21: ĉu la homaro sukcesos bremsi la pandemion?

Amri Wandel,

UEA estrarano pri Scienca kaj Faka Agado

Kiam aperis la koronaviruso, malmultaj kredis ke dum apenaŭ unu jaro oni sukcesos produkti efikan vakcinon, sed ĝi realiĝis: sojle de 2021 alvenis la unuaj vakcinoj. La esperoj estis altaj, sed nur malmultaj landoj sukcesis efike vakcinigi gandan parton de la enloĝantoj. Inter ili elstaris Israelo, kie dum malmultaj monatoj vakciniĝis 60% (vidu la grafikaĵojn 3-4) de la enloĝantoj kaj fine de majo 2021 la pandemio aspektas kiel fora koŝmaro.



Ekde junio Israelo nuligas la lastajn limigojn aplikitajn pro la koronavirusa pandemio, sekve de plurmonataj tre malaltaj niveloj de infektado kaj de pozitivaj testoj (vidu la grafikaĵojn 1-2). Tio estas preskaŭ miraklo, konsiderante ke kvin monatojn pli frue Israelo havis la plej altan procentaĵon en la mondo de novaj infektitoj. En la sekvaj linioj mi prezentas artikolon pri la esperoj kaj timoj rilate la vakcinon, kiun mi verkis en januaro 2021 por revuo “Esperanto”, sed daŭre restas aktuala, almenaŭ por la plimulto de la mondo. Sekvas ĝisdatigo pri la pandemia situacio en Israelo kaj en la mondo.

La artikolo de januaro 2021:

La mondo urĝe bezonas vakciniĝi kontraŭ la koronaviruso, science konata per la nomo SARS-CoV-2, la viruso kiu kaŭzas Kovid-19.

En 2020 estis pli ol 80 milionoj da konfirmitaj infektitoj kaj 1.8 milionoj da mortintoj. Laŭ publikaj opinisondoj ĝis la fino de 2021 tiuj nombroj kreskos ĝis 250-350 milionoj da infektitoj kaj 3.5-4.5 milionoj da mortintoj. Tamen la jaro 2021 alportas bonajn novaĵojn, sed verŝajne ankaŭ aŭguras konflikton, diskriminacion kaj seniluziiĝon. La bonaj novaĵoj estas, ke la vakcinado jam komenciĝis. Ĝis la fermo de tiu ĉi numero (1.1.2021) la plej vakcinitaj landoj estis Israelo (17% de la loĝantoj), UAE (8%), Bahreino (4%), Britio (1.6%) kaj Usono (1.6%). Kurioze, tri el ili (Britio, Usono kaj Israelo) ankaŭ estas inter la plej infektitaj, ĉ.800 novaj infektitoj tage per miliono da enloĝantoj.

En la venontaj monatoj novaj vakcinoj sekvos la sukcesajn unuajn du (Pfizer-BioNTech kaj Moderna). Tio estas atesto pri la potenco de scienca kunlaboro. Evoluigo de vakcinoj kutime bezonis 10-20 jarojn, sed nuntempe ekzistas pli ol 300 projektoj de vakcino, inkluzive dekojn en progresintaj klinikaj provoj. Tiuj projektoj promesas valorajn progresojn en vakcina esplorado, ĉar diversaj teamoj atakas la viruson de malsamaj anguloj. Iuj vakcinoj sekvas la malmoderan manieron uzi mildigitan viruson. Aliaj, kiel la vakcino Pfizer, malfermas novan vojon, ekzemple, preparante la imunsistemon per virusaj genoj (la tiel nomata mRNA metodo). La vakcinoj de la ĉi-lasta speco estas pli facile fabrikeblaj grandskale, kaj pli rapide kaj facile adapteblaj al mutacioj.

Alia esperiga atingo, kiu efektiviĝos, se ĉio bone iros, eble eĉ antaŭ la fino de 2021, estos vakcinoj en kvantoj sufiĉaj por ke la disvastiĝo de la pandemio povu esti malrapide bremsita. Vakcinoj ankaŭ povas protekti infektitajn homojn plifaciligante iliajn simptomojn. La koronaviruso ne subite malaperos, sed eventuale, iom post iom fariĝos tolerebla, kiel multaj specoj de malvarmumo.

Malgraŭ tiu optimisma takso estas antaŭvidebla multe da kaoso kaj malbono. La ondo de vintraj malsanoj en la norda hemisfero estis severa. Antaŭmendi, produkti, distribui kaj administri miliardojn da dozoj da konkurencaj vakcinoj certe prezentos problemojn kaj estos granda defio por la registaroj.

Tempo povas ŝpari vivojn, do prave la instancoj rapidas aprobi vakcinojn. Pro la tempo-premo Rusio kaj Ĉinio aprobis la uzon de vakcinoj, kiuj ankoraŭ devas esti testataj en la tria fazo. Povas evidentiĝi ke tiuj vakcinoj funkcios malpli efike aŭ kaŭzos komplikaĵojn. Ankaŭ vakcinoj kiuj ricevas urĝan rajtigon en la Okcidento bezonas atentan kontroladon, ĉar ili povas funkcii malsame en diversaj grupoj aŭ doni nur efemerajn avantaĝojn. Pro tio aperas multaj teorioj – jen kvazaŭ-sciencaj, jen konspiraj - kial oni devas eviti tiujn vakcinojn.

Produktado de pluraj vakcinoj komenciĝis. Pfizer promesis 50 milionojn da dozoj antaŭ la fino de 2020. Malgraŭ tio, pligrandigi la produktadon de la vakcino estos giganta tasko. La Seruma Instituto, la plej granda produktanto de la mondo, avertis, ke ne estos sufiĉe da dozoj por vakcinigi la tutan homaron ĝis 2024 aŭ pli.

Manko de la "malvarmaj ĉenoj" necesaj por konservi iujn vakcinojn, inkluzive tiujn de Pfizer, je minus 70 C° povus kaŭzi malfruojn. Povus okazi manko de homoj trejnataj por administri vakcinojn. Konsiderante, ke la pandemio kostis al la mondo ĉirkaŭ 8% de la monda produkto en 2020, malemo investi en tiaj aferoj timante malŝpari monon certe estus eraro.

Povus okazi bataloj inter ŝtatoj. Ĉinio kaj Rusio jam uzas vakcinan provizon por pligrandigi sian mondan influon. Usono kaj Britio eble provos reteni provizojn da vakcino por siaj propraj civitanoj. Multaj vivoj estas en risko. Modelo de Nordorienta Universitato en Bostono sugestas, ke se 50 riĉaj landoj ricevos la unuajn 2 miliardojn da dozoj de vakcino 80% efika, 33% de la mortoj pro Kovid-19 estos ŝparitaj, dum se la vakcino estos distribuita laŭ la loĝantaro de landoj, la nombro de ŝparitaj mortoj estos preskaŭ duobla. Tiaj konsideroj inspiras COVAX iniciaton por certigi egalan disdividon de la vakcinoj. Vakcinobataloj povas okazi ankaŭ ene de la landoj. Se limigitaj provizoj devas ŝpari kiel eble plej multajn, sanservaj laboristoj devas esti vakcinitaj unue, poste la plej enriskaj tavoloj, kiel la pli aĝaj, sed ofte ĝuste tiuj personoj trovas sin malantaŭe en la vico.

Paradokse, post kiam la provizo jam troviĝos en sufiĉaj kvantoj, la problemo povas renversiĝi, al rezignacio kaj rifuzo vakciniĝi flanke de kontraŭvakcinuloj kaj de skeptikuloj maltrankvilaj pro la tro rapida aproba procedo. Enketoj trovis, ke kvarono de la plenkreskuloj tutmonde rifuzus vakciniĝi. Tamen, se la vakcinoj efikos pli ol 90%, kiel ŝajnas tiuj de Pfizer kaj Moderna, registaroj povos persvadi plej multajn de siaj civitanoj vakciniĝi.

Ĉio ĉi povas fariĝi koŝmaro por registaroj, kiuj devos klare komuniki pri la scienca racio por aproboj kaj la kriterioj por disdono. Oni devos investi multe en provizoĉenoj kaj trejnado, sciante, ke parto de tiuj elspezoj estos vanaj. Kaj ili devos klarigi al siaj civitanoj, kiel la tuta mondo gajnos, se landoj kunlaboros por distribui la vakcinojn pli juste.

Ĝisdatigo junio 2021

Krom en Israelo la vakcinoj estis relative rapide aplikitaj en Britio kaj Usono, sed en la cetera mondo multe malpli rapide, ĉu pro manko de sufiĉaj kvantoj de la vakcino, ĉu pro ne efika amasvakcinigo kaj burokrataj baroj. Aperis novaj variantoj de la viruso, iuj, kiel la brita va-

rianto, pli kontiĝaj kaj pli rapide disvastiĝantaj.

La nivelo de infektado atingis novajn altecojn en multaj landoj, aparte en Eŭropo kaj Barato. Fine de majo 2021 la monda nombro de infektitoj atingis 170 milionojn, la nombro de mortintoj pro Kovid 19 – estis 3.5 milionoj, kaj la suma nombro de vakcindojoj – 1.7 miliardoj. La tempa evoluo de la novaj kazoj por miliono da enloĝantoj estas montrita en la grafikaĵo 1, por Israelo, Britio, Usono, Germanio kaj Barato. Eblas vidi la grandan kreskon en januaro 2021 en la unuaj tri landoj. Alia mezuro, eĉ pli objektiva estas la procentaĵo de pozitivaj testoj, ĝin oni vidas en grafikaĵo 2. La evoluon de la vakcinado en pluraj landoj oni vidas en grafikaĵo 3, kaj la situacion fine de majo en la histogramo 4.

Implicoj por Esperantujo

En aprilo la Tel-Aviva klubo komencis denove funkcii ĉeeste, post unujara virtuala funkciado kiel Israela Virtuala E-Kunveno (IVEK). La unua fizika kunveno okazis eksperimente en nova loko en Ramat Gan la 20.4. Ĝin partoprenis 14 s-anoj. Oni decidis tamen reveni al la malnova klubejo en Bejt WIZO, kie okazis jam la dua ĉeesta kunveno du semajnojn poste. Oni decidis sekve kunveni alterne ĉeeste kaj virtuale, por konservi la partoprenantaron de eksterlando kaj de foraj lokoj en Israelo, akiritan dum la pandemia jaro.

La 21-a **Israela Kongreso** en Tel-Avivo, kiu estis prokrastita de 2020 al aprilo 2021, estis denove prokrastita al la 7-9 de oktobro-21. Preskaŭ ĉiuj 70 aliĝintoj (el ili 25 eksterlandanoj) diris ke ili volonte partoprenos en oktobro. ELI esperas ke pliaj aliĝos dum la proksimaj monatoj, kiam la kvarantenaj reguloj por eksterlandanoj mildiĝos. Vidu pliajn informojn sur la dorsa kovrilo.


En januaro mi skribis: “UEA prepariĝas unuavice al virtuala kongreso, konsiderante, ke pluraj aliĝintoj el aliaj landoj ne povos partopreni pro la enmigraj limigoj”. Efektive meze de aprilo UEA nuligis la Universalan Kongreson en Belfasto. Anstataŭe denove okazos **Virtuala Kongreso – VK2** (vidu detalan artikolon pri tio en la junia n-ro de “Esperanto”).

Pluraj aliaj E-kunvenoj kiujn oni esperis jam okazigi ĉeeste, aŭ almenaŭ hibride, devis fine okazi plene virtuale. Kvar tiaj kunvenoj, en kiuj mi partoprenis kaj prelegis estis: KAEST (novembro), LUMINESK (jarŝanĝe), PSI (marto) kaj la **Germana-Pola-IFEF “Trans-**


ponta” kongreso (majo), kiu estis jam prokrastita de 2020. Aparte elstaris la lasta, al kiu aliĝis ĉ. 350 personoj. Kadre de tiu kongreso okazis Scienca Universitata Sesio (SUS) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Fine de mia prelego pri nigraj truoj okazis virtuala ekzameno, kiun partoprenis 22 el ĉ. 80 spektantoj. Tiuj nombroj estas similaj al la antaŭpandemiaj grandaj Universalaj Kongresoj. Ĉu virtualaj aŭ hibridaj kunvenoj estos nia estonteco? Certe la esperantistoj, kiel la tuta homaro sopiras al la ĉeestaj kunvenoj, sed povas esti ke ne plu ekzistas revenvojo al la malnovaj kutimoj.

Citita en pakistana E-revuo



La artikolo aperinta en la februara n-ro de Esperanto estis tradukita en la urduan lingvon kaj aperis en la pakistana E-revuo “Nia Esperanto”. Grafikaĵo el la artikolo aperis sur la kovrilo. La kunlaboro inter Amri kaj la pakistana tradukinto kaj redaktoro demonstras la potencon de Esperanto kiel ponto trans lingvaj kaj kulturaj diferencoj.



2. Procentaĵo de pozitivaj testoj



3. Parto de la enloĝantaro jam vakcinita



4. Parto plene kaj parte vakcinita

“ISRAELA ESPERANTISTO” prezentas israelajn esperantistojn

GAVRIEL “GABI” ZEEVI
membro de ELI-estraro

EL RAKONTOJ DE MALJUNULO

Mi naskiĝis en malbona jaro, 1942, kaj en malbona loko – Budapeŝto. Du semajnojn post mia naskiĝo mia patro, - kiel ĉiuj judoj en certaj aĝoj – estis vokita al deviga laborservo apud la hungara armeo. Ili estis senditaj al la ukraina fronto, sen taŭgaj vestaĵoj, sen sufiĉa manĝado (manĝprovizo), kaj sen armiloj. Unu el la mirakloj, ke li travivis kaj Ukrainion, kaj la piedan retiriĝon gis Mauthausen, kaj la koncentrejon mem.



Mi restis kun mia patrino kaj avo en Budapeŝto. Kiam la hungaraj aliancanoj ŝajnis esti nesufiĉe fidindaj por la nazia Germanio – la germana armeo eniris Hungarion, la 19-an de marto 1944. La ĉefurba loĝantaro salutis ilin aplaŭdante sur la trotuaroj, kun floroj en la manoj. Du monatojn poste ni devis alkudri grandan flavan sespintan stelon al la vestaĵoj, super niaj koroj (mi, estante dujara knabo – ankoraŭ ne). Tiam estis preskaŭ unu miliono da judoj sub hungara rego. Oni dividis la landon je zonoj, kaj komencis sendi la judojn al koncentrejoj – parte laborigi, parte - ekstermi ilin. Dum tri monatoj ili sukcesis lokigi la tutan judaron ekster la ĉefurbo, kion oni lasis por la fino, ĉar tie estis la plimulto (el ĉiuj 4 homoj surstrate unu estis judo). Sed – oni koncentrigis la judojn de Budapeŝto komence en centoj da flavstele markitaj domoj, kiuj estis malfermitaj nur kelkajn horojn tage.



Panjo kun 2-iaraj mi, kun
flava 6-pinta stelo.

Budapeŝto 1944, ĉe la geto

Ni devis fermi kaj forlasi nian antaŭan loĝejon.

El tiu “porjuda” domo ni sukcesis eskapi, parte per falsaj paperoj, parte, ĉar mi estis ĉarme blonda. Sed tio ne daŭris longe, ĉar mia avo estis nigrahara, kaj ie surstrate li altiris la atenton de germana

gardisto. Alia miraklo, ke li, post konvinkigante pri la “judeco” de mia avo, simple direktis kaj akompanis nin al la Granda Geto – anstataŭ murdi nin surloke.

Tiutempe ĉ. 70 mil judoj estis en tiu geto. Ni trovis loĝejon en strato Tamburo 41, proksime al la Granda Sinagogo. En la kelketaĝa domo vivis multaj familioj, inter ili ankaŭ niaj parencoj en la unua etaĝo, kiuj akceptis nian triopon, kvankam ĉiuj vivis en unu granda ĉambro. La hungaraj nazioj prenis mian onklinon el la loĝejo al Dachau, alian onklinon, ŝian edzon kaj la infanon al Auschwitz, - do ni restis nur tri en la loĝejo.

La milito proksimiĝis al la fino. Pli kaj pli bombadoj venis kaj trafis la ĉefurbon. Unu tagon mia avo, kiu fumis tiutempe, vidis, ke li ne havas cigaredojn. Li malsupreniris, por provi akiri kelkajn. Mia patrino kuiris en la kuirejo, mi, du kaj duonjara knabo, estis en la ĉambro. Mia patrino rakontis, ke mi ne volis dormi, kaj laŭte ploris, vokis ŝin. Ŝi ne volis ĉesi la kuiradon - eble la infano trankviliĝos. Sed mi daŭre ploris – do, ŝi lasis la potojn, kaj trairis al la ĉambro. Subite alvenis aeratako, la usonaj aviadiloj komencis bombadi. Unu bombo trafis nian domon, kaj tranĉis ĝin je du. La parto, kie estis antaŭ minuto la kuirejo – falis. La ĉambro kun mi kaj mia patrino restis preskaŭ sendifekta – nur ĝia muro kun la fenestro al la strato falis, kaj ni trovis nin kvazaŭ en malfermita skatolo de unu direkto. La eksplodon aŭdis mia avo surstrate, kaj kuregis al ni. Li vidis nin de la strato – ni loĝis en la unua etaĝo, kaj nun ni staris super la negranda profundo de la strato. Mi ne scias, de kie mia avo akiris sufiĉe longan lignan ŝtupetaron, sed li forkuris kaj rapide revenis kun ĝi. Ni ne hezitis descendi. Ni sukcesis surstratiĝi – post ni subite la tuta domo kolapsis. Ni trairis al alia loko en la geto, en iun kelon. La 18-an de januaro rompita lignan muron de la geto sovetia tanko, eliris el ĝi sovetiaj soldatoj. En nian kelon eniris malalta soldato, kaj diris: “Homoj, iru hejmen!” Ni komencis piediri al la direkto de nia iama loĝejo, kiun ni fermis tiutempe. Nur kelkaj kilometroj! Ĉirkaŭe estis neĝo. Mi estis sur la brakoj de mia patrino. Subite ŝi glitis sur io sub la neĝo, mi falis, ŝi ekkriis. Estis kadavro de frostita ĉevalo, sur kiu ŝi glitis. Je la krio subite alkuris homoj, kelkaj kun sitelo kaj hakilo, ĉar ili serĉis manĝeblajn aĵojn. Finfine ni alvenis al nia iama loĝejo. Ĝi ne estis fermita. Sed interne ne restis io ajn krom la blankaj muroj. Du malgrandaj ĉambroj, kuir -

ejo, banĉambro kaj necesejo. Loĝloko de malriĉaj judoj, eble 10 judaj familioj el la 33 de la trietaĝa domo. La najbaroj “purigis” ĉion en la loĝejo, kaj ni estis feliĉaj, ke ili ne volis okupi ĝin.

Tamen, ni sukcesis organizi kaj komenci la vivon denove. Post malmulta tempo mia patrino trovis dum kuirado, ke mankas al ŝi sukero. Ŝi iris al unu de la najbarinoj peti iom. Ŝi revenis pala. Ŝi rakontis, ke post kiam ŝi eniris en la ĉambron de la najbarino, ŝi ekvidis sur la muro grandegan broditan bildon de balerino. Ĝi estis nia. Sed – kiel ŝi rakontis – ŝi ne kuraĝis diri ion ajn. “Tiu tempoj povos ankoraŭ reveni” – ŝi diris.

Mian patron liberigis la usona armeo en Gunskirchen, inter la malmultaj restintoj. Li iris al la ŝoseo, haltigis malgrandan ŝarĝaŭtomobilon, tiris la ŝoforon el ĝi, kaj simple prenis la aŭton. “Nun ĝi estas mia!” – li diris. Ne estis rezisto. La usona arma ofico plenigis la aŭton per diversaj sekaj manĝaĵoj kaj konservoj, kaj mia parto veturis hejmen. En la loĝejo aperis antaŭ mi, trijara knabo, iu nekonata viro, kiu vidis min kiam mi estis dusemajna bebo. Mia patrino diris: “Konatiĝu! Li estas via patro”.

Multfoje oni demandis min: “Kial vi enmigris en Israelon?” Se ili estus travivantaj, kion mi sukcesis travivi – ili ne demandus... Pli serioze: por ke miaj venontaj gefiloj, tion ne travivu...

Postskribo: Dekunu jarojn poste eksplodis en Hungario ribelo kontraŭ la tiama reĝimo kaj la sovetia reĝo. Ni loĝis en la sama domo. La hungaraj soldatoj forkuris hejmen, la sovetiaj ankoraŭ ne envenis – dum tiu mallonga periodo 200 mil homoj eskapis el Hungario, multaj el ili – judoj. Foje antaŭ nia domo ekhaltis grandega duobla ŝarĝaŭtomobilo, kaj estis skribita sur ĝi: Budapeŝto – Vieno. Ĉiu, kiu volis foriri al Aŭstrujo kun iom da havaĵo, devis pagi al la ŝoforo, kaj povis veturi. Kelkaj el la judaj familioj forveturis. Mia patro diris: “Ni estas bonaj hungaroj, ni ne forlasos la landon”. Li havis profesion, pezan fizikan laboron, kiun li faris dum sia tuta vivo, por ke ni, liaj du gefiloj, povu lerni en la universitato. Dank al li – mi tuj trovis laboron en mia elektita nova-malnova lando, - kvankam ne la lando de mia patro, sed de miaj prapatroj.

La loko de la domo en strato Tamburo 41 ankoraŭ estas vaka, mi sukcesis viziti ĝin. Barita, sed nenio estas konstruita tie, anstataŭe...

LA FORPASOJ...

Nome de ELI-estraro kaj israelaj esperantistoj, ni esprimas niajn sincerajn kondolencojn al: **Gabi Zeevi** – li funebras la forpason de sia bofrato, **Vilmoŝ Benczik**, kiu estis fama esperantisto, iama prezidanto de Hungara E-Asocio, Honora Membro de UEA, verkinto de multaj antologioj, eldonisto de Esperantaj libroj, ano de la Akademio de Esperanto.



Ankaŭ Pola E-Asocio spertis gravan perdon...

En la aĝo 83 jaroj forpasis **Andrzej Pettyn**, unu el la plej konataj voĉoj en Esperantujo.

Andrzej Pettyn (19.04.1938 - 23.04.2021) estis fama kaj vaste konata en Esperantujo pola esperantisto. Ĝuste lian velurecan baritonan voĉon multaj el ni aŭdis en elsendoj de Pola Radio, per lia voĉo parolis la fama Mazi el Gondolando. A.Pettyn aŭtoris ĉ. 50 lernolibrojn, vortarojn, ekzercarojn, legolibrojn kaj kasedojn kun parolekzercoj. Li estis membro de UEA ekde 1958 kaj delegito ekde 1959, honora membro de UEA ekde 2005. Ekde 1975 li estis membro de la Akademio de Esperanto.



Robert Kamiński, Prezidanto de PEA

Natura fenomeno – ni maljuniĝas, forpasas por cedi la agadkampon al nova generacio. Neeviteble. Mi konscias tion, sed forpaso de miaj dumvivaj amikoj vundas mian koron. Jen mi adiaŭis ankoraŭ unu Homon, ege karan por mi. **Vladimir Samodaj** (1935-2021)... Mi fieras, ke ni estis amikoj. Efektive – ekde aktiva partopreno en fondo de SEJM liaj iniciatoj kaj agoj estis ekstreme valoraj.

Inter tiuj mi nomu almenaŭ eldonon de ses suplementoj al “Moskvaj Novaĵoj” en Esperanto, kio estis vere preskaŭ nebla en Sovetio. Li verkis poemojn, tradukis kantojn, redaktis literaturajn revuetojn eldonatajn en Moskvo. Post fondo de la Asocio de Sovetaj Esperantistoj li iĝis vicprezidanto de tiu, kaj post restarigo de SEU – ties unua prezidanto. En 2004 UEA proklamis lin sia Honora Membro.

Mikaelo Bronŝtejn



ESPERANTO - NE NUR KOMUNIKILO

Disleksio kaj Esperanto

*Hans Dahl, Svedio,
el la revuo "Esperanto" № 1, 2012*

Disleksio aŭ vortblindeco estas lingva malkapablo, kiu malhelpas uzi la lingvon, ĉefe lerni ĝuste legi kaj kompreni vortojn kaj frazojn. Ofte la homo ne memoras, kion li legis, kaj mise rekonas eĉ la literojn aŭ la numerojn. Ĝi signifas laŭvorte problemon pri vortoj. La lingvaj kapabloj estas malbonaj, kaj ofte ankaŭ la lernado de la fremdaj lingvoj estas malfaciligita. Ĝi ne estas emocia problemo, malalta nivelo de inteligenteco aŭ manko de sensoj. (Wikepedio)

En la 1930-aj jaroj oni nomis ĝin stultaĵo, kiun facilis kuraci per vangofrapoj. En la 1950-aj oni parolis pri vort-blindeco, en la 1970-aj - pri malfacileco en skribado. Ekde 1990-aj tiun problemon oni komencis nomi "disleksio" - neŭrologia depravocio ĉe legado. Al mi, ostaĝulo de la malsano, helpis la lingvo Esperanto. H.D.

Lastatempe la fenomeno estas traktata en amaskomunikiloj, kvazaŭ temus pri nova, populara fenomeno. Por homo trafita de tiu ĉi handikapo ĝi estas neagraba memoraĵo pri la unua lerneja jaro. Kvankam nun olda, mi tre bone memoras la penigajn leg- kaj skribleciojn. La kondiĉoj por efika lernado ne estis bonaj en mia eta vilaĝa lernejo. En komuna ĉambro unu instruisto okupiĝis pri tri diversnivelaj klasoj. Disleksio povas aperi en diversaj gradoj, de tre malfacila handikapo ĝis nur iom malrapida legkapablo kaj ortografia stumblado. Mi havis bonŝancon, miaj problemoj apartenis al pli milda formo. Disleksiuloj estas tre sentemaj kaj impresiĝemaj al la ĉirkaŭaĵo; babilado kaj alia bruo forte distras ilin. Ortografia ekzercero estis temo por aparta kajero. La lernantoj devis uzi bluan inkon kaj ŝtalplumon. Ni skribis laŭ diktado. La instruistino poste korektis nian skribon per ruĝa inko, kaj per grandaj ciferoj ŝi markis la erarojn. Kelkfoje ŝi montris mian kajeron al la tuta klaso, kiel verkon de senespera neinstruebla lernanto. Estis samkvante da ruĝa kaj blua koloroj, do iom distance la skribaĵo fariĝis violkolora. Fine de la kvina klaso mia instruistino postulis ke mi postrestu en la klaso. Pro tio miaj gepatroj aranĝis transiron al alia lernejo, tri kilo-

metrojn for de la hejmo. La nova instruisto baldaŭ komprenis miajn legajn kaj ortografiajn problemojn. Li ne povis forpreni mian disleksion, sed permesis al mi montri miajn kapablojn en aliaj studfakoj kiel naturscio, geografio kaj matematiko, kiuj ne estis problemaj. En la slojdĉambroj mi havis honoran pozicion, kelkfoje mi eĉ instruis miajn samklasanojn. Mia instruisto sciis ke se mi kapablus altigi mian memfidon, la disleksia problemo estus malpli granda. Honoron al tiaj instruistoj! Kelkajn jarojn post la elementa lernejo mi sentis la bezonon kompletigi miajn praktikajn kaj mekanikajn lertojn per teorio. Studado ja povas kaj esti interesa kaj doni pli bonan salajron. Baldaŭ mi trovis ke perkoresponda studado estas taŭga metodo por mi. Nenia nigra tabulo, kie mi devis montri mian malkapablon, aŭ konstati nesufiĉan tempon por la tasko. Neniu rikanis pro mia malrapida legkapablo. Mia edzino afable korektis miajn taskojn. La perleteraj kursoj estis tre bonaj, rapide mi atingis kontentigajn rezultojn. Disleksio estas lingvo-handikapo, sed okazas ke disleksiuloj (kun helpo) povas esti eĉ bonaj verkistoj. Tamen, lerni fremdajn lingvojn estas tre malfacile, malbona fonetiko kaj senorda ortografio povas saboti eĉ la plej kuraĝan provon.

La korespondlernejo postulis ke mi kontentige sciu almenaŭ unu fremdan lingvon por ricevi plenvaloran ekzamenon. Mi provis lerni la germanan kaj poste la anglan, sed pro seniluziiĝo mi forĵetis la kurslibrojn, diskojn kaj bendojn, kaj mi ĵuris ne plu okupi min per tia frenezaĵo. Iutage en loka gazeto mi vidis anoncon pri Esperanto-kurso. Mi aŭdis, ke ĝi estas facile lernebla kaj ke oni parolas kiel oni skribas. Do, almenaŭ ne simila al la angla. Tre kritikema mi iris por aŭskulti la informon. Ĝi ŝajnis al mi interesa ideo, klara kaj bonorda, speco de konstruludo. Esperanto kaptis min. Mi kapablis kunmeti frazojn per vortoj kun reala signifo, eĉ sen esceptoj! Mi ne asertas ke mi aŭ alia disleksiulo senprobleme lernas Esperanton, sed la diferenco kun naciaj lingvoj estas grandega. Kial mi pli frue ne rimarkis kaj ne lernis tiun ĉi tre valoran lingvon? Kial miaj gepatroj kaj lernejoj instruistoj ne prezentis Esperanton al mi? Ili ja ĉiuj konis mian handikapon. Kion scias disleksiuloj ĝenerale pri la kvalitoj de Esperanto? Post dujara studado mi trovis leteramikon en Germanio. En feria tempo li invitis min kun mia edzino resti dum unu semajno en ilia familia

rondo. Kun iom da dubo pri mia lingva scio ni akceptis la inviton. Vera aventuro, ni faris nian unuan eksterlandan vojaĝon per aŭto kun nur Esperanto kaj iomete da germana lingvo.

Mi ĝis tiam malmulte parolis Esperante, legi kaj skribi ja ne estas dialogo. Pro tio mi dum la veturo serĉis kontaktojn kun polaj kaj ĉeĥaj esperantistoj, por plibonigi mian parolan lertecon antaŭ la alveno al mia germana amiko. Tiel mi kvazaŭ per helpo de magia vergo povis interparoli kun poloj, ĉeĥoj – kaj post kelkaj tagoj halti ĉe la germana familio. La vojaĝo estis vera triumfo, danke al la Zamenhofa inventaĵo. De tiam mi vizitis multajn landojn helpe de Esperanto. Mi konstatis ke la prononcoj de esperantistoj en diversaj landoj estas malpli variaj ol la dialektoj ene de la naciaj lingvoj mem. Esperanto devus esti, laŭ mia percepto, mondscale infektoma kiel la azia gripo. Kial ne? La tendenco de tutmondiĝo per unu nacia lingvo estas danĝera evoluo. La gepatraj lingvo kaj kulturo estas neperdebla hereda trezoro, parto de nia identeco. En multaj landoj, ekz. en Svedio, gejunuloj devas studi kaj uzi la anglan ĉe studado de iuj fakoj. Do, via propra lingvo ne plu estas taŭga en via propra lando. Ĉu ne temas pri subpremo de nia identeco? Lastatempe la fenomeno disleksio ricevas pli da atento. Disleksiuloj en elementa lernejo ofte ne kapablas atingi kontentigan nivelon en la sveda kaj angla lingvoj, kaj pro tio ne rajtas studi en gimnazio. En pli altaj lernejoj oni ofte uzas angla-lingvajn studmaterialojn. En Svedio pli-malpli 5-8% de la popolo suferas pro disleksio. Mi supozas ke povas esti same en ĉiuj landoj.

Disleksio ne estas malsano kuracebla per operacio aŭ medikamento, sed ia nivelo de aparta kapablo. Do, mi komparas disleksion kun ekzemple muziko, ĵonglado, matematiko aŭ homa konduto. Ajnan kapablon oni povas neglekti aŭ evoluigi. Laŭ mia propra sperto Esperanto estas la plej taŭga helpilo por disleksiuloj. Surprizas min, ke mi ĝis nun ne vidis disertacion aŭ alian seriozan raporton pri la valoro de Esperanto por disleksiuloj.

Tia dokumento necesas por pruvi mian aserton. Esperanto povas al disleksiulo:

- 1) minimumigi la tedecon dum lingvolecionoj kaj eviti senlogikan ortografion;
- 2) doni memfidon, identecon kaj kanalon al pli vasta mondo;

3) doni tempon por evoluo de la ceteraj talentoj;

4) ebligi plibonigi la uzon de sia gepatra lingvo.

Esperanto estas por disleksiulo serioza afero, ne nur hobbio. Li bezonas ĝin kiel helpilon. Per la pruvita utileco de Esperanto en lingva kaj precipe disleksia edukado Esperanto ricevos pli respektindan pozicion. La angla metodo "Springboard to Languages" pritraktas la problemon. Mi komprenas, ke precipe anglaj, lingve netalentaj lernantoj en pli kaj pli anglalingva mondo ne emas lerni la propran gramatikon. Por ili taŭgus Esperanto por facile lerni alian lingvon de roman-germana grupo.

NDLR. Laŭ mia opinio, ĉi tiu artikolo estas serioza argumentilo en informado pri Esperanto

INTERESE...

Nun la homaro kvantas proksimume 7,8 mlrd da homoj. Por pli bone kompreni la situacion, ni reduktu tiun kvanton proporcie ĝis 100 homoj.

El tiuj 100 homoj: 11 loĝas en Eŭropo, 5 – en la Norda Ameriko, 9 – en la Suda Ameriko, 15 – en Afriko kaj 60 loĝas en Azio.

En vilaĝoj loĝas 49 homoj kaj 51 – en urboj.

Oni parolas: en la ĉina -12 homoj, en la hispana – 5 homoj, en la angla – 5 homoj, 3 parolas en la araba, po 3 – en la hinda, bengala kaj portugala, po 2 en la rusa kaj japana. En siaj lingvoj parolas 62 homoj.

Havas kie loĝi - 72 homoj, kaj 23 estas senhejmuloj. Tre bone manĝas 23 homoj, 63 – pli-malpli bone nurtas sin kaj 15 ne satmanĝas.

La diurna kosto de vivteno de 48 homoj estas malpli ol 2 \$.

Trinkeblan akvon havas 87 homoj, kaj 13 estas devigitaj trinki praktike netaŭgan akvon.

Havas poŝtelefonon 75 homoj kaj 25 – ne. Uzas Interreton 30, kaj 70 ne havas por tio kondiĉojn.

Superan kleron havas 7 homoj, 93 – ne lernis en kolegioj, scipovas legi 83, kaj da nelegoscias estas 17 homoj.

Pri religio: estas 33 kristanoj, 22 muzulmanoj, 14 hinduismuloj, 7 budhaistoj, 12 – havas aliajn religiojn, kaj 12 ne estas religiemaj.

26 homoj vivas malpli ol 14 jarojn, 66 mortis en la aĝo de 15 ĝis 64

jaroj, nur 8 homoj supervivas 65 jarojn.

Do, se vi havas propran loĝejon, vi manĝas plenvvalorajn manĝaĵojn kaj trinkas puran akvon, vi havas poŝtelefonon, vi povas krozi tra la Interreto kaj havas eblon lerni/studi, do vi membras en eta privilegiita parto (malpli ol 7%).

El 100 homoj nur 8 havas ŝancon ĝisvivi 65 jarojn.

Se vi atingis 65-jaran aĝon, estu kontenta kaj danka.

Gardu vian vivon. Vi jam estas benita homo.

Zorgu pri via sano kaj aprezu ĉiun vian vivmomenton!

Tradukita de Mikaelo Lineckij (prenita de Interreto)

Karaj legantoj de “Israela Esperantisto”!

Permesu al mi memori al ĉiuj, ke d-ro Zamenhof kreis la Internacian Lingvon, kiu poste ricevis la nomon “Esperanto”, speciale por plifaciligi komunikadon inter diverslingvaj homoj de la tuta Tero! Bedaŭrinde multaj esperantistoj preskaŭ ne uzas tiun mirindan ilon laŭ ĝia rekta destino. Ofte esperantistoj dronas en lingvistikaj disputoj damaĝe al senperaj homaj kontaktoj. Ankaŭ la instruistoj ne ofte emfazas al siaj kursanoj, kiucele ili lernas tiun lingvon. Ofte en kunsidoj de E-kluboj mankas eksterlandaj novaĵoj.

Al la adreso de ELI venis letero el Japanio kun jena enhavo:

“Karaj samideanoj! Ni petas vin, anonci al viaj membroj, ke Koresponda Servo de JEI peras korespondadon inter japanaj kaj eksterlandaj korespond-dezirantoj. Jen estas la adreso:

*Koresponda servo de Japana Esperanto-Instituto,
Sinzjuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, 162-0042, Japanio.
Jen estas ankaŭ la elektronika adreso: esperanto@jei.or.jp*

Provu uzi tiun eblon kaj, povas esti, vi trovos bonajn amikojn en malproksima Japanio...

Ni subtenu la ĉefideon de Zamenhof!!!



INTERVJUO KUN LA FAMULO

Uzante fakton de mia persona konateco kun la fama kaj ĝis nun tre aktiva esperantisto Renato CORSETTI, mi decidis peti lin doni intervjuon por “Israela Esperantisto”. Li afable konsentis...



M.L. En kiu aĝo Vi eksciis pri Esperanto?

RC. En la jaro 1957-a mi partoprenis junularan tendaron en Germanujo por membroj de la organizaĵo de junaj katolikoj. Mi estis 16-jara. La tendumejo estis en bavara vilaĝo, Eisenstein, kaj iun tagon venis maljunulo kaj disdonis al ĉiuj tendumantoj strangajn poŝtkartojn en la germana pri iu *Intenationale Sprache Esperanto*. Mi, kiu tiutempe paroletis la germanan, demandis la estron de la tendaro: “Kiu estas tiu homo?”- kaj li respondis: "Temas pri stultulo, kiu loĝas en la apuda kamparo." Do, la afero finigis tiel, sed mi ne forĵetis la poŝtkarton kaj portis ĝin hejmen. Retrovinte ĝin en miaj paperoj post du jaroj, mi provis kompreni, kio estas ĉi tiu Esperanto, kaj per enciklopedio trovis la unuajn informojn. Post ankoraŭ unu aŭ du jaroj, mi ekstudis en la universitato kaj interesiĝis pri lingvoj, kaj iun tagon en librovendejo en Romo en la bretaro pri lingvoj mi trovis lernolibron pri Esperanto. La cetero estas nur banala rakonto. La plej malfacila parto de la rakonto rilatas al la problemo trovi la Esperanto-grupon en Romo. Tiam ne estis la reto kaj la Esperanto-grupo ne estis en la telefonlibro. Tamen post ankoraŭ unu aŭ du jaroj mi sukcesis. Mi daŭre provis poste trovi la 'maljunan stultulon' en tiu bavara vilaĝo, sed li intertempe, verŝajne, mortis.

M.L. Ĉu tuj aperis deziro lerni la lingvon?

R.C. Kiel mi jam diris, mi interesiĝis pri lingvoj. Mi lernis la norman italan en la lernejo, transirante al ĝi de mia gepatra sudita dialekto, la latinan, la francan, kaj komencis interesiĝi pri aliaj lingvoj. Trovinte la lernolibron de Esperanto mi nature mem lernis ĝin, kaj post iom da tempo mi trovis en la hejmo de la onklino de amiko malnovan ekzempleron de la tiama revuo “Nuntempa

Bulgario” en la itala. Evidente iu en tiu familio estis komunisto kaj ricevadis tiun revuon, kiu fiere anoncis en kiuj lingvoj oni eldonas ĝin, inkluzive Esperanton. Mi pensis, ke ne estas eble, ke oni sukcesas paroli pri ĉiuj modernaj aferoj en Esperanto, kaj por certigi pri kiel oni solvas tiun nesolveblan problemon (mi tiam nur lernis Esperanton sed ne parolis ĝin kun iu kaj ne legis ion en ĝi), ĉar mi legis en tiu revuo, ke oni povas aboni ĝin en difinita librovendejo de la komunisto-partio, mi iris kaj abonis ĝin. Tiel mi komencis eniri la Movadon, kaj per adreso en la lernolibro mi malkovris, ke ekzistas itala Esperanto-movado, kaj tiel laŭgrade...

M.L. Kiom intense Vi lernis Esperanton?

R.C. Ne tre intense, sed, se oni jam konas kelkajn fremdajn lingvojn, almenaŭ lege, oni relative facile povas kompreni la enhavon. Cetere granda parto de la vorttrezoro estas travidebla por italoj. Mi devas aldoni ke je la aĝo de 14 mi transiris al la supera mezgrada lernejo, kie mi devis lerni la germanan (ĉar antaŭ la milito la itala ministerio pri lernejoj decidis, ke la germana estas la internacia lingvo de la nova faŝisma Eŭropo, kaj dungis instruistojn pri la germana, kiuj pluinstruis post la dua mondmilito kaj ĝis la pensiiĝo al infanoj, kiuj estis senditaj aŭtomate kaj sen eblo protesti al tiuj lecionoj).

M.L. Post kiom da tempo Vi eksentis, ke Vi pli-malpli ekposedis la lingvon?

R.C. Tiam ĉio estis pli malrapida ol nun. Pasis ankoraŭ unu aŭ du jaroj de kiam mi trovis la adreson de la Itala Esperanto-Federacio ĝis la momento, kiam mi renkontis la unuajn vivantajn esperantistojn en Romo, tiam mi konstatis, ke mi komprenas ĉion, sed ne kapablas paroli, ĉar mi neniam parolis ĝin, nur legis. Sed la transiro al parolkapablo postulis nur kelkajn monatojn, ĉar mi komencis viziti ĉiusemajne la kunvenojn en Romo, kaj je mia naiva demando: "Ĉu ĉiuj esperantistoj estas maljunaj?" oni senhonte mensogis, ke ekzistas multaj gejunuloj, ke mi devas viziti junularajn aranĝojn, ktp.

M.L. Kiu estis la unua via kunparolanto?

R.C. Mauro La Torre, kiu, bedaŭrinde, mortis antaŭ kelkaj jaroj, estinte prezidanto de ILEI kaj kun kiu mi kunlaboris la tutan vivon.



Mauro La Torre

M.L. En kiu aĝo Vi partoprenis en la unua Via internacia renkontiĝo?

R.C. En la jaro 1968-a mi partoprenis junularan renkontiĝon en Italujo, kiun partoprenis gejunuloj el multaj landoj. Mi ne plu memoras kial en tiu jaro oni aranĝis internacian junularan kunvenon en Italujo dum Pasko. Mi veturis tien kun Mauro La Torre kaj la unuan fojon mi kunparolis kun eksterlandaj esperantistoj sen apartaj problemoj. Vi povas kalkuli ke de 1957 ĝis 1968, mi bezonis 11 jarojn por iri de la unua informilo al la unua internacia kunveno.

M.L. Kiu estis la unua okazo, kiam Vi konvinkiĝis pri utileco de Esperanto?

R.C. Kiam la unuan fojon mi legis la revuon Nuntempa Bulgario, kaj vidis ke ili sukcesas paroli pri modernaj aferoj. En tiu numero estis io pri la konstruado de fabriko. Do, ne temis pri literaturo, sed pri konkretaj aferoj.

M.L. Ĉu Vi povas rememori la emociojn, spertitajn de la unua renkontiĝo kun eksterlanda esperantisto?

R.C. Mi memoras, ke dum unu tuta mateno mi parolis en la ekskursiva buso kun junulo pri pluraj problemoj. Li parolis Esperanton sen nacia aŭ dialekta apartaĵo en la elparolo, kaj mi pensis, ke li estas el Milano, sed en la vespero mi demandis italon, kiu estas tiu junulo, kaj oni respondis, ke li estas pola esperantisto. Tiam mi havis la saman emocion, kiel la kongresanoj en Bulonjo-ĉe-maro: Esperanto funkcias!

M.L. Kiujn postenojn en la Movado vi okupis antaŭ ol fariĝi UEA-Prezidanto?

R.C. Mi estis kune kun Mauro La Torre respondeculo pri rilatoj kun neesperantistaj organizaĵoj en Italujo. Tiam en TEJO oni nomis tion KER-agado, poste mi iĝis helpsekretario de TEJO, kaj poste ekhavis postenojn en la itala movado, loka kaj nacia kaj iĝis komitatano A por Italujo en UEA kaj poste prezidanto de TEJO. Esence mi ĉiam agis samtempe loka en Romo, lande en Italujo kaj poste internacie en TEJO kaj UEA.

M.L. Kiu el la postenoj estis plej plaĉa por Vi?

R.C. La posteno, en kiu mi lernis plie esti la unua, kiel respondeculo

de la Itala Esperantista Junularo pri rilatoj kun NRO-oj. Tiam mi malkovris la mondon de la asocioj kaj lernis kiel praktike verki kaj sendi cirkuleron, multobligi informfoliojn, aranĝi labor-tendarojn, ktp.

M.L. Dum via prezidanteco en UEA kion vi volus ŝanĝi, aldoni aŭ korekti ion en la funkciado de tiu grava internacia organizaĵo?

Kiujn viajn revojn vi sukcesis (aŭ malsukcesis) efektiviĝi estinte UEA-Prezidanto?

R.C. La unua afero, kiun mi rimarkis estis la misekvilibro inter tio, kion la asocio enspezas pro kotizoj kaj tio kion ĝi elspezas por servi la komunumon (ne por disvastigi Esperanton, sed por liveri servojn al la komunumo de la jam-parolantoj). Ĉiuj diris tiam, ke mi volas detrui la Centran Oficejon, kaj intertempe tiu situacio detruis la Centran Oficejon.

La dua afero, kiun mi rimarkis estis, ke la plej bonaj energioj de la movado estas utiligataj por uzi Esperanton, dum informado kaj instruado estas trankvile lasataj al la landaj asocioj, kiuj siavice volonte lasas tion al la lokaj kluboj, ktp. Sekve la komunumo estis ĉiam pli fermita en si mem kaj ĉesis dialogi kun la neesperantista mondo. Ankaŭ pri tio, iom paradokse, mi ne sukcesis konvinki UEA-n pri Esperanto alivorte pri la bezono disvastigi Esperanton. Tio, pri kio mi eble iomete sukcesis, estis doni la ideon, ke oni devas tutmondigi la movadon. En tiu periodo Hans Bakker faris sian heroan disvastigon de Esperanto tra Afriko. Estis starigitaj pli bonaj rilatoj kun Ĉinujo kaj kun kelkaj sudamerikaj landoj. Sed kaj mi kaj ĉiuj aliaj gvidantoj de la movado ne komprenis la malbonan efikon al Esperanto de la firmigo de la usona imperio en la mondo. La usona imperio ne estas tolerema kiel la persa imperio de la tempoj de la ekzilo en Babilono. Ĝi postulas, ke vi parolu ĝian lingvon kaj sekvu ĝian religion, la religion de la dio merkato. Dum longa tempo multaj el ni pensis, ke Eŭropo volos konservi sian sendependecon kaj sian kulturen plurecon kaj do Esperanto havas ŝancojn en Eŭropo. Ni eraris.

Bedaŭrinde ne sufiĉis loko en "Israela esperantisto"-171 por enmeti plenan tekston de la intervjuo. Mi petas paciencan atendon ĝis la decembro por legi ĝin plene. La redaktoro.



Por krei konvenan humoron, ni komencu konsumi la “LitSupon” de porcio da judaj anekdotoj...

Odesa* anekdoto

Du amikoj en odesa sinagogo ĉeestas la preĝon kaj unu al la alia diras:

- Abrahamĉjo, mi havas al vi grandan peton: mi volas, ke vi post la preĝo retenu la rabenon por almenaŭ du horoj por ke li nenien foriru...

- Kiucele?

- Nu... vidu.... mi havas rendevueton kun lia edzino...

- Kaj pri kio mi parolu kun li?

- Pri io ajn: pri filozofio, pri Kabalo, pri Torao, pri Esperanto...

Gravas, ke li dum du horoj restu ĉi tie. Mi petas vin, kiel la plej bonan amikon...

Abrahamĉjo iom pensetis kaj diris:

- Nu, bone...

Tuj post la preĝo, Abrahamĉjo alvenas la rabenon kaj diras:

- Sinoro rabeno, jen kia estas la afero – mi ne tre bone komprenis kelkajn fragmentojn el la hodiaŭa preĝo. Mi komprenis tion tiumaniere... Kaj li komencis rerakonti la preĝon. La rabeno longe aŭskultis tiun deliraĵon kaj diras:

- Bone, Abrahamĉjo, ĉu vi povas diri, kiucele vi tiom longe al mi tion rakontis? Sed, bonvolu, diri nur la veron – vi ja scias, ke Dio ĉion vidas kaj aŭdas.

- Sinjoro rabeno, mi pardonpetas, sed tion mi faris por mia bona amiko. Li diris al mi, ke li havas rendevueton kun via edzino...

- Abrahamĉjo, kara, mi konsilas al vi kuri rapide hejmen – ne havas mi edzinon...

* Odeso - sudukraina urbo, en kiu loĝis multe da judoj. Signifa parto de ili nun loĝas en Israelo.

Jerusalema anekdoto

Foje tri jerusalemaj knaboj disputis pri tio, kies paĉjo estas plej rapida.

- Mia paĉjo kuras pli rapide ol sago, - diras la unua.
- Kaj la mia povas atingi celon pli rapide ol kuglo, - diras la dua.
- Tio estas bagateloj, kompare kun rapideco de mia paĉjo, - diris la tria, - li laboras en jerusalema oficejo kaj li estas pli rapida ol tempo. Li finas laboron je la 4-a tage kaj hejme li estas jam je la 3-a!

Junulo venis al rabeno kun la demando:

- Rabĉjo! Mi havas deziron vivi eterne! Kion mi faru por tio?
- Edziĝu!
- Kaj ĉio? Ĉu post tio mi vivos eterne?
- Ne! Simple tiu via deziro tre baldaŭ forlasos vin...



Estis hela tago. En la loĝejon invadis rabisto. Li ligis manojn kaj kru-rojn de la virino kaj, minacante per pistolo, postulis de la viro ĉiujn valoraĵojn, kiuj estis en la hejmo.

- Kara, - larmante petegis la viro, - prenu de mi ĉion, kion vi volas, sed malligu kaj lasu ŝin libera.
- Ĉu vi tiel amas la edzinon? - demandis la rabisto.
- Ne, ŝi estas edzino de la najbaro, la mia devas baldaŭ veni...

KIEL FARTAS VI?

Mi sidis ĉe trinkeja vendobreto fiksinte la rigardon al mia glaso, kiam grandega, minacaspekta motorciklisto proksimiĝis al mi, prenis mian trinkaĵon kaj malplenigis la glason per unu gluto.

- Nu, kaj kion vi faros nun? – minace raŭkis li, kiam mi ekploris.
- Hodiaŭ estas plej malbona tago en tuta mia vivo, - diris mi. – Mi estas 100%-a kompatindulo. Mi malfruiĝis al la grava renkontiĝo kaj la ĉefo maldungis min. Kiam mi venis al la parkejo, evidentigis, ke mia aŭto, kiun mi ankoraŭ ne sukcesis asekuri, estas ŝtelita. Mi lasis la monujon en taksio, per kiu mi veturis hejmen. Hejme mi estis surprizita, ekvidinte la edzinon kun iu viro, kaj poste mia hundo mordis min. Kaj jen, mi venis en ĉi trinkejon por kuraĝigi min por

ke mi metu finan punkton al ĉio. Mi aĉetis la trinkaĵon, ĵetis en ĝin venenigan tablojdon kaj observis kiel ĝi solviĝas... Sed subite venis vi kaj malplenigis mian glason. Nu, eble sufiĉas paroli nur pri mi, ĉu? Rakontu al mi, kiel fartas vi?..

RAKONTETOJ KUN MORALO

1. Foje muso rimarkis, ke la majstro instalas muskaptilon. Ĝi rakontis pri tio al kokino, ŝafino kaj bovino. Ili ĉiuj rezonis per jeno: Muskaptilo estas via problemo, nin tio tute ne koncernas!

Iom pli poste la muskaptilon trafis serpento kaj mordis edzinon de la majstro. Provante kuraci ŝin li estis kuirinta supon el la kokino. Poste estis buĉita la ŝafino por prepari manĝaĵon por la gastoj, kiuj venis konsoli la murdinton. Poste venis vico de la bovino - ja necesis regali ĉiujn venintojn post la reveno de la tombejo... Ĉion ĉi observis la muso tra trueto en la muro, kaj ĝi pensis pri la afero, kiu koncernas neniun.

Moralo: eĉ se io vin rekte ne koncernas, vi ne pensu, ke tio ne povas frapi ankaŭ vian kapon.

2. Aglo sidis sur branĉo de arbo, faris nenion - simple ripozis.

Malgranda kuniklo, vidinte la aglon, demandis ĝin:

- Ĉu ankaŭ mi povas same sidi kiel vi, kaj fari nenion?

- Certe, kial ne, - respondis la aglo.

La kuniklo sidiĝis ĉe la arbo kaj ekripozis. Subite aperis vulpo, kaptis la kuniklon kaj formanĝis ĝin.

Moralo: por sidi kaj fari nenion, vi devas sidi tre, tre alte.

3. En iu farmo ekmalsanis ĉevalo. La veterinaro diris:

- Se ĝi matene ne ekstaros, mi ĝin "dormigos"...

Matene la ĉevalo ne ekstaris. Ŝafo, kuŝinta apude diris:

- Ekstaru do, se vi tion ne faros, vi estos buĉita.

La ĉevalo ekstaris.

- Tio estas miraklo! Tion necesas festi! Ĉi kaze mi buĉos la ŝafon!

Moralo: neniam miksiĝu en alies aferojn (sed ne forgesu kazon pri la muskaptilo).

4. Tri homoj transportadis ŝtonojn. Oni demandis al unu el ili:

- Kion vi faras?

Li viŝis ŝviton de la frunto kaj respondis:

- Mi laboraĉas...

Oni demandis la duan:

- Kaj kion faras vi?

Tiu respondis aferece, suprenfaldante la manikojn:

- Mi perlaboras la monon.

La tria al la sama demando respondis:

- Mi konstruas la templon.

Moralo: la vivo nur de tiu estas plena de senco, kiu iras al nobla celo.

5. Taksiisto veturigas faman en la urbo milionulon. Alveninte, tiu donas la monon ĝuste konforme al la takskalkulilo. La taksiisto:

- Mi veturigis hieraŭ vian filon kaj li donis al mi, kiel trinkmonon, 100 dolarojn...

- Nu, kion povas diri mi: lia patro estas milionulo, kaj mi estas orfo...

Moralo: nur tiu, kiu mem perlaboris sian monon, scias ĝian veran valoron.

6. Foje en monaĥejo juna monaĥo, ĵus monaĥiĝinte, ricevis sian unuan taskon reskribi kelkajn preĝojn, psalmojn kaj leĝojn. Okupiĝinte pri tio, li rimarkis, ke la aliaj diservantoj reskribas similajn tekstojn ne de la originalo, sed de la antaŭaj, neunufoje reskribitaj kopioj.

Mirigita, li diris pri siaj duboj al la estro de la monaĥejo.

- Sankta patro, la fratoj reskribas la tekstojn ne de la originalo, sed de la kopioj, kaj se subite en la unua kopio iu hazarde faris eraron? Ja tiuj, kiuj reskribas, ripetados ĝin...

- Hm, filo mia – respondas la estro, - ĝenerale ni faris tion dum jarcentoj... Sed, principe, en via rezonado estas logiko, - kaj, dirinte tion, li iris en la arkivejon, kiu troviĝis en profunda kelo sub la monaĥejo, kie jam delonge estis konservataj la originaloj, kiujn neniu tuŝis dum jardekoj, ĉar oni ĉiam reskribis de la kopioj.

Li iris kaj... malaperis...

Post diurno de lia malapero, la maltrakviliĝinta junulo iris en la arkivejon por ekscii, kie estas la sankta patro, ĉu nenio malbona okazis al li? Ne tuj la juna monaĥo trovis lin... Veninte en la plej malproksiman ĉambron, li ekvidis la malaperinton. Tiu sidis prostracie antaŭ malfermita manuskripto, ion balbutanta...


- Kio okazis, sankta patro, - ekkriis la junulo, - kio okazis?!

- “Celebrate”, - elĝemadis la estro de la monaĥejo, - en la originalo estas “celebrate”! Sed ne “celibate”!

Rimarko: “celebrate” estas festu, ĝoju, kaj “celibate” – abstinadu (seksuma abstinado estas unu el fundamentoj de katolikismo)

Moralo: konsultu ĉiam nur la originalon!

Permesu prezenti al vi: **Eŭgenia Slovaĉevskaja** - tre neordinara Esperanto-poetino kaj bardo el Ukrainio. Se iu ekinteresiĝos pri ŝia verkaro pli - kontaktu la redaktoron aŭ rekte ŝin: es-peranto@bigmir.net



Mi somere verkis vin por mi –
Ĉu aliaj ne sufiĉis libroj?..
Mia rev' infana pri amik'
Resonigis mian koron vibre.
Mia sonĝ' virina pri l'Amat',
Mia strebo homa al la Homo
Kaj sopir' fratina pri la Frat'...
Ho, bukedo da kortuŝfantomoj!
Resaniga vortoterapi'
Transformiĝis nun al narkotilo...
Sekve estas tempo jam por mi
T trovi novan koran kuracilon:
Mia am' patrino al filin',
Instruista varto al lernantoj
Mia ŝat' al libroj kaj por fin' –
Mia kora am' al Esperanto!
Kion do – finiĝas mia kant',
Por refreno ne sufiĉas fortoj...
Sed ne haltas viv', ja Esperant'
Ne finiĝas nun kun miaj vortoj...
Mia strebo homa al la Hom',
Mia ina rev' pri princ' amanta
Estas eble eroj de fantom'
Sed ne trompas mia Esperanto!
*(La teksto havas ankaŭ
originalan aŭtoran melodion)*

Dolor' via havas milionajn subtonojn.
Mistere flagrecas iliaj glimbriloj,
Moroze belegas konturoj bonstilaj...
Sed strebas l'anim' for el bela prizono.
Al ĉielo senlima - flugile - liberen!
Al suno senborda, senfunda feliĉo!
Sed ne, nur plenkore, plenvive, plenriĉe.
Kaj... jes! Kun doloro. Ĉiome. Tutvere.
Ho sun' de l'anim'! Vi ne scias la larmojn.
La murojn l'animo nur meme konstruas,
Kaj ludas per ili, kaj ŝanĝas, kaj ĝuas -
Ŝanĝiĝi kaj kreski - jen cel' de l'animo!
Rigardu! Forestas baraĵoj, prizonoj,
Sed plena je Amo - el Hejmo rigardo -
Palac' perlamutra brilantas jam arde -
La Amo ja havas milionajn subtonojn...

Gravas iri ne "ĉiam rekten",
"Ĉiam supren" kaj tiel plu -
Gravas trovi la verdirekton,
Propran sekvon de l'vivoflu'...

6 kurtaj rakontoj kun profunda senco




1. Foje, ĉiuj vilaĝanoj decidis komune preĝi por la pluvo. En la interkonsentita tago kolektiĝis ĉiuj, sed nur unu knabeto venis kun ombrelo. Tio estas **KREDO**.



2. Kiam ni suprenĵetas la infanojn, ili ridas, ĉar ili certas, ke ili estos kaptitaj. Tio estas **KONFIDO**.



3. Ĉiuvespere ni enlitiĝas sen ajna certeco, ke ni vekigos, tamen ni agordas la vekhorloĝojn. Tio estas **ESPERO**.



4. Ni havas grandajn planojn por morgaŭ, kvankam ni nenion scias pri la estonto. Tio estas **CERTECO**.



5. Ni vidas, kiel suferas la tuta mondo, tamen ni geedziĝas kaj naskas infanojn. Tio estas **AMO**.



6. Sur sportĉemizo de aĝa virino estas skribita: "Mi havas 80 jarojn, sed mi sentas min, kiel 16-jarulino kun 64-jara staĝo".

Tio estas **ĜUSTA VIVPOZICIO!**

Ĉion bonan al ĉiuj! Provu vivi laŭ tiuj rakontetoj



La 21-a Israela E-Kongreso

Laŭplane ĝi devis okazi en aprilo 2020, sed pro la pandemio estis prokrastita al 2021, unue al aprilo kaj poste - al oktobro. La nunaj datoj estas 7-9 de oktobro, kaj ELI rezervis blokon de 20 ĉambroj en la planita kongresejo, la gastejo Bnej Dan. Kompreneble ni ne povas nun scii, kiuj estos la reguloj por eksterlandanoj, espereble vakcinitaj turistoj ne bezonos kvantenon. Fine de majo 2021 rekomencis veni al Israelo unuaj grupoj de turistoj el eksterlando.

Programo: La antaŭvidita programo estos la sama kiu devus okazi pasintjare (detala programo estis sendita siatempe). Matene: ekskursoj – vendrede al Malnova Jafo, sabate al la apuda parko Jarkon kaj la Malnova Haveno de Tel-Avivo. Posttagmeze: prelegoj kaj laborgrupoj. Vespere: koncertoj kaj teatraĵoj.

Aliĝo kaj nuligo-kondiĉoj: Ĉiuj siatempaj aliĝintoj (israelanoj kaj eksterlandanoj) estas aŭtomate registritaj, se ili antaŭpagis. Por unu persono du noktoj en dulita ĉambro inkl. matenkaj vespermanĝojn - 486 NIS. En unulita ĉambro - 860 NIS.

Limdatoj:

1. Senpaga nuligo ĝis 8.8.2021. Israelanoj ĝis tiu dato pagu al ELI 50%, eksterlandanoj – 50 EUR (krom tiuj kiuj jam antaŭpagis tiun sumon).
2. Nuligo post 8.8 kaj ĝis 23.9.2021 kostos 50%
3. Ĉiuj devos ĝis 23.9 alpagi la plenan kotizon:

Israleanoj – ĉambro + 100 NIS programo (se ne antaŭpagita) **Eksterlandanoj** – 185 EUR.

Novaj aliĝoj estas bonvenaj, sed post la 8.8 ne estas garantiita ĉambro en la kongresa gastejo. Por aliĝi skribu al eli@esperanto.org.il.

Antaŭkongresaj ekskursoj: Estas planitaj du ekskursoj: 1-5.10 Jerusalemo, Morta Maro, Masada kaj Eilat – 450 EUR, se kun Jordanio kaj Petra – 600 EUR, kaj 5-7.10 – Haifa, Akko, Nazareto kaj Lago de Galileo – 300 EUR. Profesia ĉiĉeronado en Esperanto.

